Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Marto-Aprilo 2018 | n-ro 03-04 (1353-1354)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Se vi scius

Ho kiel mi vin enviadegas
Vi, kiu moviĝos sur grundo sen filandlimoj
Vi, kiu engaĝiĝos sen estroj nek ŝafaroj
Vi, kiu profitegos mondon sen militado
Vi, kiu renkontos vivulojn sen perfortaĵo
Vi, kiu aŭskultados sen netoleremo
Vi, kiu respondos aliulon sen armilo

Se vi scius
Ho kiel mi vin ĵaluzadegas
Vi, kiu enspiros aeron sen poluecoj
Vi, kiu nutriĝos per manĝaĵoj sen toksvenenoj
Vi, kiu pripensos socion sen nesciado
Vi, kiu vidos suferadojn sen apatio
Vi, kiu trairos vivadon sen malriĉeco
Vi, kiu agos ĉiufoje sen frivoleco

Dismetitaj en ĥaoso
Inter niaj fikciegoj : nacioj kaj religioj
Ni vivas konflikte sen respekto, indulgo kaj amo
Esplori, trovi, kunligi kaj semi grajnojn el koro
Tiel estas nia vivo, tiel estas niaj devoj
Ĝis la morto de la fajro

Se vi scius
Ho kiel vi min plezurigegas
Vi, kiu moviĝos sur grundo kun tuteblecoj
Vi, kiu engaĝiĝos kun samidealanoj
Vi, kiu profitegos mondon kun simbiozo
Vi, kiu renkontos vivulojn kun bonkoreco
Vi, kiu aŭskultados kun konsidereco
Vi, kiu respondos aliulon kun brakumo

Se vi scius
Ho kiel vi min feliĉigegas
Vi, kiu enspiros aeron kun sanaj gasoj
Vi, kiu nutriĝos per manĝaĵoj kun bonsubstancoj
Vi, kiu pripensos socion kun altklereco
Vi, kiu vidos suferadojn kun emocio
Vi, kiu trairos vivadon kun sereneco
Vi, kiu agos ĉiufoje kun modereco

Kunigitaj en frateco
Sur via unika lando : la bela planedo Tero
Vi vivos harmonie kun homoj, bestoj kaj naturo
Scivoli, lerni, transdoni kaj frandi ĝojojn el koro
Tiel estos via vivo, tiel estos via rajto
Ĝis la morto de la suno

TERANO



## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen iom malpli dika marto-aprila numero de Sennaciulo. La paĝokvanton ni malaltigis por rekapti la malfruon sen perdi la eblon transdoni informojn tamen kun ia reguleco. Kiel por la numero januara-februara, la redaktoprocezo estis simpligita, kaj ni ne prenis tempon por sisteme transdoni al la aŭtoroj kontrolendajn versiojn de iliaj enpaĝigitaj kontribuoj. Ni kalkulas kun la komprenemo kaj partoprenemo de ĉiuj por laŭeble fin-rekapti la normalan ritmon antaŭ la somer-paŭzo de la norda hemisfero. Tiam eblos ankaŭ rekapti pli normalan labormanieron.

Kiel kutime aperas debatvekaj tekstoj, kiuj foje en la redaktejo levis reagojn. Ĉu vi kapablos diveni, pri kiuj temas, kaj esprimi vian propran vidpunkton, se vi opinias ke iuj temoj estas traktitaj en neekvilibra maniero?

Lasta sed ne balasta afero: se vi intencas ĉeesti la 91an SAT-kongreson en Kragujevac, bonvolu aliĝi senprokraste, tio faciligos la laboron de la organizantoj.

La redaktoskipo

## *Venontaj limdatoj*

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 7-8/2018 (1355-1356) : 15a de junio

Sennaciulo 9-10/2018 (1355-1356) : 15a de aŭgusto

**Kovrilpaĝa bildo**

Panorama vidaĵo de Kragujevac. Transdonis la OKK.

## *Enhavo*

Enhavo


### Beletra Angulo
2 Se vi scius Terano
23 ReVene de ReVe Serĝo SIR'
24 Veganaj argumentoj Serĝo SIR'

### Tra la Mondo - Ameriko
4 Vaŝingtono relanĉas la atoman vetarmadon Michael KLARE
6 La perfido de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ)
7 Stalin numero 2 Dmitrij MART

### Tra la Mondo - Kurdio
9 La lukto de Kobano, ekzemplo por Afrino
10 La marŝado de la kurda revolucio
11 Biblioteko ĉe la patrina domo

### Tra la Mondo - Eŭropo
12 La registaro de Latvio meritis nulon! Andris NATINŜ
13 Per sankcioj kontraŭ naziismo Sergej VLADIMIROV

### Medio
14 Notre-Dame-des-Landes Raoul VANEIGEM

### Historio
15 Kartvelio 1918-21 kiel nova mito pri "ora epoko" Nikolao GUDSKOV

### Tra Esperantio
17 La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) Liba GABALDA

### Nekrologo
19 Laura Viellefond

### 91a SAT-kongreso
20 Turisma programo
23 Aliĝintoj

### El la SAT-Administrejo
22 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj
19 Preseraroj Sennaciulo 2018-01/02


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***